

# 12-a Esperantista Migrado Aŭtuna EMA 2024

20-a ĝis 25-a de oktobro 2024
(dimanĉo ĝis vendredo)
en Arnsberg / Sauerland

© Gerald Roemer

# Programo kaj loko

Ĉiutagaj migradoj en la ĉirkaŭaĵo de Arnsberg (Vestfalio, sudoriente de Dortmund), kaj en aliaj partoj de la „Sauerland“, mezalta svinganta montaro, markita de ĝis 840 m altaj montoj, densaj arbaroj, larĝaj herbejoj kaj klaraj lagoj, kun multaj eblecoj je travivaĵoj naturaj, kulturaj, historiaj ktp. Ni migrados sur arbarkulturaj vojoj apud la iama monaĥejo Rumbeck, sur panoramovojo ĉirkaŭ Arnsberg kaj en ĝia malnovurbo, tra la „Ruhr“-valo, en la Naturparko Arnsberga Arbaro, al la „Möhne“-lago kaj de Brilon al la „Fera Monto“ kun vizito de iama minejo. Publikaj trafikiloj estas relative oftaj. Laŭbezone ni uzos ilin.

Detala programo: **www.esperanto.de/ema**

La programo estas provizora kiel dum ĉiuj migradoj, dependas de la aktuala vetero. Sen aparta vespera programo. Kiu ŝatus oferti programeron, bv. informi la organizanton.

## Necesa sporteca kapablo

Ĉiutage ni migros proksimume de la 9-a ĝis la 17-a horo – inkluzive paŭzojn. Estos kaj facilaj kaj meze malfacilaj etapoj. Oni kapablu iri distancon de ĉ. 15 km kun altodiferencoj ĝis 300 metroj.

## Arnsberg

Arnsberg konsistas el pluraj urbetoj, mem havas ĉ. 18.500 enloĝantojn kaj estas sidejo de la distrikto Arnsberg. Dum pluraj jarcentoj ĝi estis rezidenca urbo kaj en la 19-a kaj 20-a jarcento administra urbo, nun ĝi ankaŭ estas komerca centro de „Hochsauerland“. La malnovurbo surmonta kun kastelo estas ĉirkaŭfluata de la „Ruhr“-rivero.

https://arnsberg-info.de/
https://www.sauerland.com

# Nia tranoktejo kaj kostoj

## Nia tranoktejo

La junulargastejo situas 2 km sudoriente de la malnovurbo kaj 3 km de la stacidomo, kun buskonekto. Ĝi posedas 110 litojn. Ĉiuj niaj ĉambroj havas duŝon/necesejon. Migradvojoj komencas apud la junulargastejo.

**SGV Jugendhof Arnsberg**
Hasenwinkel 4 · 59821 Arnsberg
Tel. +49 2931 5248-25 · Retpoŝte: jugendhof@sgv.de
Interreta paĝo: https://sgv-jugendhof.de/

## Kostoj

| | ĝis 2024-03-31 | ĝis 2024-06-30 | „malfruaj birdoj“* |
|---|---|---|---|
| Kotizo | 375€ | 395 € | 415 € |

* 2024-07-01 ĝis 2024-08-15

Tiu partoprenkotizo validas por unu persono: En 2-lita ĉambro aŭ en plurlita ĉambro por du personoj. Ĝi inkludas 5 tranoktojn kun matenmanĝo, 5 varmajn vespermanĝojn, 4-foje provianton survoje, enirbiletojn kaj transportojn.

**Krompago** por 1-lita ĉambro: 55 € (aŭ se vi ne trovos kunulon/kunulinon por via ĉambro)

**Rabato** de 30 € por ordinaraj membroj de Germana Esperanto-Asocio kaj por homoj, kiuj ne loĝas en Germanujo

# Aliĝo kaj kontakto

Via aliĝo ekvalidos post atingo de la antaŭpago de minimume po 50 € por persono sur la konton de

Deutscher Esperanto-Bund
Sparkasse Odenwaldkreis · BIC: HELADEF1ERB
IBAN: DE32 5085 1952 0040 1145 71
Eblas ankaŭ pagi al la UEA-konto: geaa-n

Sur la ĝirilo indiku kiel koncernon:
„EMA 2024“ + via familia nomo

**Vi pagu eventualan reston ĝis 2024-06-30.** Por la „malfruaj birdoj“ la aliĝo ekvalidos nur per la pago de la plena kotizo.

**Malmendo:** La antaŭpago de 50 € ne estos repagata, sed vi povas peri anstataŭanton. Ni aldone fakturos la eventualajn kostojn de malmendo post la 2024-08-15.

Per via aliĝo vi eksplicite deklaras vian konsenton kun tiuj ĉi kondiĉoj.

## Maksimuma nombro de aliĝoj:

16 – pliajn aliĝojn ni devos interkonsenti kun la junulargastejo.

## Bonvolu aliĝi elektronike:

**en la interretaj paĝoj: www.esperanto.de/ema**

## Organizanto / kontakto:

Gerald Roemer, Hamburgo, Germanio
Telefone ene de Germanio: 0800-336 36 36-66
Retpoŝte: ema@esperanto.de

© Germana Esperanto-Asocio r.A. 2024